// FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

Organo de FRANCA LIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ, filio de IKUE

=============== LA HOUSSAYE-en-BRIE (Seine-et-Marne) FRANCE ========

==

Prezidanto : S-ro R. Cl. COLAS,- 6, rue de Mézières,- PARIS -6-
Sekretario : S-ro Jean BARRIER, 89, rue Salengro, - DRANCY -93-
Kasistino : S-ino J. VINCENT, rue des Oiseaux, - LES ANDELYS -27-

C.C.P.- Ligue Française Espérantiste Catholique, - ROUEN - 23 24 93 K.-

--- Abono : 4 Fr + kotizoj : 1 Fr = sume = 5 Fr-

:::

Redaktorino : S-ino J. VINCENT, rue des Oiseaux, LES ANDELYS -27-

Sendu la materialon por la bulteno antaŭ la 1-a de januaro, la 1-a de aprilo, la 1-a de Julio, la 1-a de oktobro.

++

*** N° 89 *** BULLETIN TRIMESTRIEL *** TRIMONATA BULTENO ************

Sankta PIO X-a, preĝu por ni.

--- Julio 1971-

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

E N H A V O :

Paĝoj		Paĝoj	
2 & 3	Bileto de la prezidanto	7	Recenzo
3 & 4	Dia amo	8	Por amatoroj pri genealogio
4 & 5	Venos la tag'.	8	Nia kongreso 1971
5	La katolika diservo en Lyon	7 & 8	Informo
6 & 7	Protokolo de la Komitatkunveno	8 & 9	Skribas la legantoj
7	Lingva angulo.	9	Nia membraro
		9	Kotiztabelo

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

30-an de aprilo/ 1-an de majo 1972 :

ĈIUJ EN MAISONS-LAFITTE ! (v.p.-8-)

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

Venonta komitatkunveno : 26-an de septembro 1971, je la 15-a, ĉe Chabrol.

===

BILETO DE LA PREZIDANTO .

Esperanto = Mondlingvo.

La vie internationale exige la compréhension mutuelle, et certainement beaucoup, dans les voyages d'agrément comme dans la pratique des affaires, ont pu éprouver quelles limites leur impose l'usage d'une langue étrangère.

Certes, bien des voyageurs diront qu'ils n'ont pas souffert au cours de visites touristiques, du faits de leurs moyens d'expression, ou ceux de leurs interlocuteurs, demeuraient réduits à quelques phrases. C'est qu'ils n'avaient guère l'ambition de dépasser le niveau des besoins matériels, et qu'ils s'en remettaient à un guide imprimé, ou à la récitation d'un traducteur, pour connaître un peu d'histoire ou apprécier, à travers les paysages et monuments, le génies des peuples cotoyés.

Il va sans dire que les contacts humains avec ces peuples, les échanges directs, les manifestations de sympathie réciproque, au moyen de gestes et de mimiques plutôt que par des conversations laissent le voyageur avide de culture sur sa faim.

Que dire alors des affaires qui se traitent à une échelle internationale ? - Les imprécisions du vocabulaire, le sens nuancé des phrases, les expressions idiomatiques, les mots dont l'usage a plus ou moins altéré la signification constituent autant d'obstacles à uneparfaite connaissance. Les rapports culturels, la communion des âmes, les échanges d'idées, de réflexions, la prière commune, ne deviennent réalité que lorsque les moyens de communication deviennent directs, que si l'on se sent de plein-pied avec l'interlocuteur.

N'attendez pas des pouvoirs publics une action généralisée en faveur d'une langue mondiale neutre. Nous assistons à la compétition des états influents pour la prééminence linguistique dans les organisations internationales. Certains poursuivent le dessein d'une "satellisation par la langue" à la faveur des blocs politiques ou économiques.

C'est aux espérantistes qu'il appartient de s'imposer, par la large diffusion de leur langue dans tous les pays. Par sa pratique courante, ils feront la preuve de son utulité,

.../...

.../...

de ses ressources, dans les divers domaines où ils se manifestent.

Il faut sortir de l'ombre, démontrer que la langue est vivante et claire, que sa facilité tant vantée n'est pas indigence, que ses services sont à la disposition de toutes les formes de pensée, de technique et de culture.

Au seuil de cet été, c'est le voeu que je forme pour chacun de nos amis. S'ils ont la chance de beaux voyages dans le monde espérantiste, ou le loisir d'approfondir la pratique de la langue, ou d'enrichir leur connaissance de "frères étrangers" ils auront fait progresser de quelques pas la marche en avante de notre Mouvement.

Agrablajn Feriojn !

R. Cl. COLAS.

****

D I A A M O

"... Nomu viajn fratojn Kompatataj. Havu juĝon kontraù via patrino, havu juĝon, ĉar ŝi ne estas mia edzino, kaj mi ne estas ŝia edzo; ŝi forigu la malĉastecon de sia vizaĝo kaj la adultemecon de siaj manoj, por ke Mi ne senvestigu ŝin ĝis nudeno, kaj ne prezentu ŝin tia, kia ŝi estis en la tago de sia naskiĝo, ke Mi ne faru ŝin kiel dezerto, ne faru ŝin kiel tero senakva, kaj ne partigu ŝin per soifo. Ankaù ŝiajn infanojn Mi ne kompatus, ĉar ili estas infanoj de malĉasto; ĉar ilia patrino malĉastis, ilia naskintino malhonoris sin; ĉar ŝi diris : Mi sekvos Miajn amistojn, kiuj donas al mi mian panon kaj mian akvon, miajn lanaĵojn kaj miajn linaĵojn, mian oleon kaj miajn drinkaĵojn. Pro tio Mi baros vian vojon per dornoj, Mi ĉirkaùbaros ŝin, ke ŝi ne trovos siajn vojojn. Ŝi postkuros siajn amistojn, sed ŝi ne kuratingos ilin; ŝi serĉos ilin, sed ne trovos; kaj ŝi diros : Mi iros returne al mia unua edzo, ĉar pli bone estis al mi tiam ol nun. Kaj ŝi ne sciis, ke mi estis tiu, kiu donadis al ŝi panon kaj moston kaj oleon, Mi donis al ŝi multe da arĝento kaj oro, kiun ili uzis por Baal. Tial Mi prenos returne Mian panon kaj Mian moston iliatempe, Mi forprenos Mian lanaĵon kaj Mian linaĵon, per kiu ŝi kovris sian nudecon. " (el Hoŝea, 2, 1/9-) .../...

.../...

NI meditu : Relegu tiun tekston de la profeto pensante pri la parabolo de la erarinta filo. La Patro, sola, memoras : "Kiam Izraelo estis infano"... Li pensas pri la malfeliĉo, kiun rezultigis la peko, sed Li diras al si mem : Pli ol kulpa, "mia popolo estas malsama pro sia malfideleco". Tiam amo, kvazaŭ senespera, venkas la dian koleron : "Mia koro estas kortuŝita ... Kiamaniere mi forlasos vin ?

Kia profundeco en la Dia koro ! Mi adoras, mi dankas .

(El "Vie chrétienne" N°129-)

==

P A R O L A S   L A   P A P O .

Via kredo, gejunuloj, kruciĝas kun via vivo. En la malkontenteco, kiu maltrankviligas kelkajn el vi, en la kritiko de la sociordo, enestas ero da lumo.

Se vi enpensiĝas, se vi mem fariĝas la plej altaj juĝistoj de via vero, se vi bloke forĵetas la pasintecon - kion penis konstrui la reprezentantoj de la homaro, al kiu vi apartenas kun la samaj ecoj kaj mankoj - tiam la estonta mondo ne estos pli bona, eĉ se ĝi estos malsama, ĉar la homa orgojla radiko de la malbono ne estos elradikigita.

Se,male, vi konsentos iri renkonten al Tiu, kiu, pli ol alia, donis pruvon de sia amo, fordonante sin por savi la homon, tiam vi eklumigos la flamon de via idealo en la fajro de Lia senlima karitato kaj vi partoprenos al la irado de la homo al la lumo...

(Parolado en Sydney, la 1-an de decembro 1970)

mmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmm

VENOS LA TAG'

Venos la tag', kiam ĉiuj popoloj
frate sin interkomprenos ĉe l' fin'
kiam la stelo de l' esperantaro
savos nin de minacanta ruin'.

.../...

.../...

Venos la tag', kiam rega perfido
ne plu splitigos l' infanojn de l' ter' ,
ne plu sukcesos, forbuĉi la vivojn,
semi ĥaoson de morta mizer' .

Venos la tag', kiam verda la flago
flirtos triumfe sur ĉiu ajn tur' ,
kiam la dia ordon' : NE MORTIGU !"
iĝos la leĝo de nia kultur'.

Venos la tag', kiam unu mondlingvo
ligos la landojn en unu konsci' :
venkos la infarajn instinktojn de l' homo
krea la kredo de l' homa geni' .

WILHELM THEODOR OESTE

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

LA KATOLIKA DISERVO EN LYON .

Dimanĉon, 11-an de aprilo 1971, dum la nacia kongreso, je la 18-a okazis katolika diservo en la kripto de la baziliko d'Ainay.

Pli ol cent kongresanoj partoprenis la meson, celebratan de Kanoniko COTE. Tiu pastro, bona esperantisto, estas blindulo. Tiel la partoprenantoj estis vere kortuŝitaj, kiam Kanoniko COTE kvankam ne vidante la terajn aĵojn, montris al ni la ĉielajn realaĵojn. Ankaŭ substrekinda la fakto ke blindulino per brajla materialo legis la tekstojn de la unua parto de la meso.

Ĉiuj partoprenantoj unuanime dialogis kun la mesoferanto kaj tutkore kantis.

Ankaŭ rimarkinda la ĉeesto de kelkaj amikoj Protestantoj.

R. D.

mmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmm

6/6/71---

KOMITATKUNVENO ----- VINCENNES

-:-:-:-:-:-:-:-:-

En la bela florparka, en agrabla ŝirmejo, la kunveno malfermiĝas je la 15.30.

Ĉeestas : S-roj Colas, Barrier, F-to Marmou, S-ino Vincent petis senkulpigon : F-ino Paulier, S-to Baudry, S-ro Ribot invititoj ; S-roj Despiney, Kraemer.

1°/- PROTOKOLO DE LA ANTAUA KUNVENO

ĝi aperis en aprila numero de la bulteno kaj estas unuanime aprobita.

2°/ KONGRESO EN ORLEANS.

Raportis Orléans-a gazeto kaj "L'Essor" en St-Etienne.

Raporto aperis ankaù en la aprila numero de la bulteno kaj estas akceptita.

3°/- ADMINISTRAJ AFEROJ.

Pro la nomŝanĝo de nia asocio, estas necese fari kelkajn ŝanĝojn en niaj statutoj. F-to Marmou prizorgos ilian multobligadon

Ni devas ankaù presigi novajn membrokartojn, ĉar la stoko elĉerpiĝis.

Post la multobligado de la statutoj, oni faros la necesan ŝanĝon ĉe la poŝtĉekkonto.

4°/- KONGRESAJ AFEROJ

1972 : La kongreso okazos en Maisons-Laffitte la 30-an de Aprilo kaj la 1-an de majo. S-roj Kraemer kaj Despiney prizorgos la preparon.

Provizora programo : dimanĉon, akcepto de la kongresanoj, komuna tagmanĝo, ĝenerala kunveno, diservo kaj distra vespero; lundo : ekskurso el St-Germain.

1973 : laù prppono de S-to Ouarnier, ni pristudas la eblecon organizi la kongreson en Compiègne aù Pierrefonds.

5°/- INFORMAJ AFEROJ

S-ino Vincent kaj S-ro Bourdeaux faris duan viziton al St-Louis d'Antin, lasis informan materialon; la deĵoranto promesis aranĝi debaton pri la lingva problemo.

La Komitato opinias utile aperigi en nia bulteno foton de la panelo en Jerusalemo pri "Patro Nia".

.../...

.../...

6°/- DIVERSAĴOJ

La komitato opinias ne eble aperigi la predikojn de S-ro Tuilley pro ilia longeco.

7°/- DATO DE LE VENONTA KUNVENO.

26-an de Septembro ĉe Chabrol.

La kunveno finiĝas je la 17-a horo.

Elironte el la ĝardeno, ni renkontis S-ron Barrier, kiu maltrafis la rendevuon, sed povis tamen vidi la komitatan laboron.

Protokolis : S-ino Vincent.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

L I N G V A A N G U L O .

Respondis al la proponoj de la aprila numero : S-ino Michau, S-roj Dauchez, Despiney, J.M. Guillon kaj Ribot.

1°/- le paon fait la roue : La pavo paradas (M kaj De); pompe prezentiĝas (M); la pavo ventumile etendas la voston (Da); la pavo radforme starigas siajn plumojn (G); la pavo rondigas sian voston (R).

2°/- ouvrir le ban (esprimo uzata nur de milita ceremonio) tambure saluti (Da); tamburi antaŭ ol komenci (De); Ektamburi (R).

3°/- avoir le don des larmes : ĉiuokaze ploradi (M); laŭvole plori (Da); esti facile plorema (De); facile ekplori (G); est plorema, laŭvole plorkapabla (R).

Ĉifoje abundas la proponoj :
1) un prénom; 2) faire l'article; 3) faire du porte à porte; 4) avoir vu monts et merveilles; 5) avoir le nez fin; 6) travailler du chapeau; 7) négocier un virage; 8) un grain de beauté; 9) une voix sourde; 10) avoir du tact; 11) un bon petit froid sec.

Nun, cerbumu !

==========

RECENZO

§"La mesaĵoj de la sinjorino de ĉiuj popoloj", de H.A. Brouwer a.a., tradukita el la nederlanda de C. Wijn.

Tiu 43-paĝa broŝuro, lukse prezentita, mencias la mesaĝojn, kiujn iu virino ricevis de Maria inter 1948 kaj 1959.

Bona traduko en klara stilo, interesa legaĵo por la katolikoj

Komitato "Sinjorino de ĉiuj popoloj"-poŝtkesto 7180- AMSTERDAM,Nederlando

---

.../...

.../...

POR AMATOROJ PRI GENEALOGIO .

Nia klubo "Renaskiĝo kaj Kulturo", kiu jam havis du aktivecojn, inter ili Esperanto (10 anoj en Epinay) ĵus fondis trian fakon : Genealogio/. Se vi konas interesaton, loĝantan en la suda ĉirkaŭaĵo de Paris, donu al li la adreson de la sekretario : S-ro X. Dauchez, 21, Grande rue, - 91-EPINAY-sur-ORGE.

§§

NIA KONGRESO 1972.

Ĉiuj veturu al Maisons-Laffitte la 30-an de aprilo kaj la 1-a de majo. Interesa programo kaj frata etoso atendas vin !

Aliĝilo kaj informo aperos en la oktobra numero de la bulteno.

!!

ANONCO

Apprenez l'Espéranto par correspondance avec le cours complet édité par la Maison Culturelle des Espérantistes Français.

1-er degré : 50 Fr; 2-éme degré : 80 Fr; 3-ème degré : 60Fr-

Union Française pour l'Espéranto, 34, rue de Chabrol, Paris-10-

C.C.P.- Paris -855-35-

$$

SKRIBAS LA LEGANTOJ .

Karaj gefratoj,

La ebleco donita al ĉiu por esprimi sian opinion ne nur estas moderna kaj demokrata, sed plie montras, ke ĉiu estas konsiderata kiel plenkreska kaj partoprenanta en la funkciado de nia Fanca Kotalika Esperanto-Asocio. Pro tio, grandan dankon al la iniciatantoj !

Ĉar la amo devas esti la motoro de nia agado, ĉiu el ni klopodu efektivigi tiun amon, signo de nia unuiĝo al Jesuo Kristo, kiu ordonis al ni : "Amu unuj la aliajn". Konsiderante, ke nia asocio devus montri perfektan fratecon, mi sugestas, ke oni helpu niajn fratojn, kiuj ankaraŭ ne povas kompreni la tekstojn de nia kara revuo. Efektive, inter ni troviĝas anoj, kiuj aliĝis pri.../...

.../...
simpatio kaj ne konas Esperanton; aliaj estas komencantoj kaj penege legetas Esperanton. Jesuo diris : "Kion vi faros al la plej malgrandaj inter vi, tio, estos farita al mi mem." Ĉu la malgrandaj inter ni ne estas la "Esperanto-vidpunkte" mutuloj aù balbutantoj ? Do, ni komparu ilin kaj por ili ni skribu nacilingve. Ke oni ĝuste komprenu min. Mi ne sugestas, ke la tuta gazeto estu france presita, sed ke almenaù unu paĝo estu france legebla.

Kore kaj frate, Roger Despiney.

Resp. D.L.R. - Plej ofte, la "Bileto de la prezidento" aperas franclingve por ebligi ĉies meditaton. La simpatiantoj povas facile trovi tradukanton por la artikoloj, kiuj interesas ilin. Se ni volas havi abonantojn eksterlande (ĝuste aliĝis kelkaj en la lasta tempo), ni devas proponi al ili taùgan materialon. Kion opinias pri tiu problemo, jam ofte debatita, la aliaj legantoj ?

****

NOVAJ MEMBROJ 1971 (daùrigo)

4) F-inoj Kraemer (Ht-Rhin)
5) S-ro Tournay (Loire)
6) S-ro Richard (L.-Atl.)
7) S-ro Vanbiervliet (Belgujo)
8) S-ro Musil (Ĉeĥoslovakujo)

£££

KOTIZTABELO 1971

IKUE kun "Espero Katolika" ..... 17 Fr
IKI kun "Vojo, Vero, Vivo" ..... 5 Fr
Peranto : G. Véron, P.Ĉ.k.- Rouen -11 88 63 Z.-

LFCE kun "Franca Katolika Esperantisto" ..... 5 Fr
infano malpli ol 16-jara ..... 2 Fr
Membro fonfaranto ..... 25 Fr
Dumviva membro ..... 100 Fr
UFE kun "Revue Française " ..... 30 Fr
UEA kun "Esperanto" kaj "Jarlibro" ..... 46 Fr

Ligue Française Catholique Espérantiste, p.ĉ.k.-Rouen- 23 24 93 K.-

==========

Dépôt légal : 3° trimestre 1971 /// Polycopié par F.M.C.
Papier de Presse : N° 34.745- /// Prieuré Saint-Martin
Directeur-Gérant : Gaston VERON /// LA HOUSSAYE
77- TOURNAN-en-BRIE
FRANCE

==========